

CNT**AIT****FAI****INTERNACIA LABORIST-ASOCIO****INFORMA BULTENO****NACIA
KONFEDERACIO
DE L'LABORO****IBERIA
ANARKISTA
FEDERACIO**Adreso: **ESPERANTO-FAKO - Av. Durruti, 32 k 34
BÁRCELONO (Hispanio)**II^a Jaro

10 Julio 1937

Numero 1

Nia komuna tasko

Kamaradoj, per tiu ĉi numero «INFORMA BULTENO» enpaŝas novan periodon. Ĝis nun ĝi aperadis ciklostilita. Ek de nun ĝi jam aperados presita. Dank' al la kontribuado de A. I. T. (Internacia Laborista Asocio). Do, kiel vi vidas, ni entreprenas ĉion eblan pri la plibonigo de «INFORMA BULTENO». Malgraŭ la milito, kiun estas devigita akcepti la hispana popolanaro, kontraŭbatalante internacian faŝismon. Malgraŭ la malkvietaj tagoj, kiujn ni travivas.

Ni ne ĉesigos nian laboron. Male, ni plue laborados, klopodados. Pli fervore, pli aŭdace. Ni informados pri diversaj aktualaj hispanaĵoj, kiuj interesas la proletesperantistojn el ĉiuj landoj de la 5 kontinentoj. Ni ja scias, ke la okuloj de ĉiuj estas turnitaj al ni.

Sed, samcelanoj, ne forgesu, ke multon dependas de vi. De viaj senrezerva solidaro k kieleblepleja helpo. Nia tasko estas komuna k ĝi nature postulas komunajn kunlaboron k klopodon.

Nia propagandilo estos tiomgrade utila, kiomgrade vi utiligos ĝin, samcelanoj. Nia batalilo Esperanto tiomgrade estos efika, kiomgrade vi efikigos ĝin. Ni k vi. Ĉar, kamaradoj, kion ni ja povus atingi, eldonante la bultenon, se vi ne priatentus ĝin? Se vi ne propagandus ĝin? Se vi ne helpadus nin morale k materiale?

Sendube nia peresperanta batalo kontraŭ la reakcio, kontraŭ la eklezio, kontraŭ la grand-kapitalismo kontraŭ la ĝemeloj Hitler k Mussolini estus senefika, ne fruktodona, sen via proleta solidaro, sen via aktiva partopreno. Nia voĉo estus voĉo en dezerto.

Pro tio, samcelanoj, liberecanoj, proletesperantistoj, donu eron da impulso en la batalon kontraŭ faŝismo, kontraŭ tiranismo, organizante sialflanke la propagandon de «INFORMA BULTENO». Propagandu ĝin inter viaj kamaradoj, sammedianoj, t. e. inter niaj proletfratoj. Interesigu ili pri ĝi. Igu ĝin surtabla libreto de ĉiu samcelano. K ĝi estu klariono, trumpeto k heroldo por pli da justo k libero.

K samcelanoj, ne forgesu ankaŭ, ĵke ni disponas limigitan monrimedon. La plua aperado de «INFORMA BULTENO» dependas grandgrade de vi. Vi ne forgesu doni sian obolon. Disvendadu la ekzemplerojn, kiujn ni al vi sendados. K sendadu monerojn. Per la lastaj vi kompensados la sendkostojn.

Ekagu, eklaboru, fratoj. Nia tasko, nia peresperanta batalo estas komuna. Ĝi estas batalo kontraŭ nia komuna malamiko—la kapitalistaro. Konsideru, fratoj, ke nur batalante sultro ĉe sultro, montrante maksimuman solidaron, ni venke sukcesos frakasi la plurkapan hidron —la faŝismon k renversi la maljustan sklavigan reĝimon kapitalisman. K tiam, konstruinte novan pli justan, pli perfektan socion, ni senĝene gaudos sunon k liberon. K nia verda proletesperantista flago flirtados tra la terĝlobo, proklamante nian venkon.

LA REDAKCIO

Al la barikadoj

Himno de C. N. J. de J. Tornybo

Nigrajn ventegojn agitas aero,
nuboj obskuraj malhelpas al vid,
malgraŭ nin atendas la dolor k morto,
kontraŭ malamiko vokas la devo nin.

La bien plej satinda
estas la libero,
ni ĝin devas gardi
kun fid k aŭdac.
Alten la standardon
la revolucian,
kiu al triumfo nin portas ja sen ĉes.

Al la batalo,
labora popolo,
penu pri l' forig de la reakci.
Al la barikadoj!!
Al la barikadoj!!
Por la triumfo de la Konfederaci.

Tr. PARIO

Internationales Esperanto-Museum in Wien
Wien I, Hohenberg, Bismarckplatz, 3, Stock

148

La krea povo de la laboristoj

La hispana Revolucio demonstris serion da egaj valoroj. Neniu en nia lando konfidis la krea povon de nia laborpopolnaro. La burĝaro konscie malmontradis la teknikajn konojn de la proletoj. La inteligentularo k la politikistaraĉo ne povis imagi, ke la laboristoj kapablas aranĝi k gvidi la politikan, socian k ekonomian vivon enlandan.

La Revolucio detruis tiujn absurdajn superstiĉojn de la superaj kastoj k plej elokvente montris, ke la ekonomia dekadenco, en kiu troviĝis Hispanio, ŝuldiĝis al la maltaŭgeco de la burĝaro k la gvidistaro. La laboristoj estis deklaritaj kiel malkapablaj produktadi la sufiĉon, k efektive la kaŭzo pri la malgranda produktadpovo ŝuldiĝis al la teknika malkompetenteco k al la monemo de la superreganta klaso.

En iuj partoj de Andaluzio, Ekstremaduro k Kastilio efektive la laboristoj ne estis sufiĉe produktopovaj, sed tio ŝuldiĝis al la ega k konstanta malsato k al la sklaveco, en kiuj ili troviĝis. Pro tio la laboristoj ne estas kulpaj, sed la respondecaj regantoj, la bankieroj k la terposedantoj, kiuj puŝis la laborpopolanaron en teruran mizeron moralan k fizikan.

Katalunio k Valencio, kiuj estas interkomunikaĵantaj pere de Mediteraneo kun Eŭropo, havas pli konscian k kleran proletaron; kiu dum la aktuala Revolucio donas pli perfektan socian k ekonomian strukturon al la lando. Aragono, najbaranta kun Katalunio k Valencio, estas ankaŭ ekzemplo por laŭdo k kapablo en la nova labororganizado. La sociala skuo, kiun oni faras en Hispanio, havas siajn kialojn en la moralaj k ekonomiaj kontraŭecoj de la kapitalista riĝimo. La malkapabla k monema burĝaro decide kontraŭstaradis ĉiun provon de la laborpopolanoj plilevi sian kulturnivelon k sian produktadpovon. Gvidata de triviala k egoista materialismo, ĝi forrabadis la

landon, venigis la hispanan popolanaron al degenero k malfialtigis la iberian civilizon. La skuo, kies atestantoj ni estas, estis malevitigebla. La interkoliziigo inter la antaŭenemaj impulsoj de la laborpopolnaro k la mezepoka reaktiva spirito estis malforigebla.

Tie, kie la faŝismo ne sukcesis altrudi sian sangoverŝantan tiranecon, la laboristoj, helpite de serio da fakuloj, aliĝintaj al la Revolucio, funkciigis la industrion, transporton k la terkulturon, unuvorte, preskaŭ la tutan ekonomian vivon.

La deficitdonaj industrioj, la ekonomie frakasitaj entreprenoj, estas reŝtorantaj sekve de la klopodoj, la kapabloj k oferto de la laboristoj.

La partopreno de la laboristoj en la politika vivo ankaŭ donis siajn fruktojn. Pere de la kolektivigoj en la terkulturo atingiĝis rimarkindaj rezultoj. La ĉiam plifortiganta progreso promesas belajn esperojn k revojn. Sen interveno de la burĝaro, kiu malatribuis al la laboristoj la vivrajton, ili kreis militindustrion, pliintensigis la terkulturadon, plialtigis sian vivnivelon, disponigis la kulturcentrojn al la popolanaro.

La laboristoj el Katalunio k ĝenerale el Hispanio, liberigitaj el la faŝismo, demonstris, ke posedas pozitivajn ecojn k kapablojn k idean moralon por aranĝi la politikan, socialan k ekonomian vivon enlandan sen superrego, sen registaraj kastoj k monopoloj.

Dum la burĝaro k la politikistaraĉo malatribuadis al la laboristoj la ĵuse menciitajn ecojn, ĝi celadis malatribui al la samaj la liberrajton, la kulturon k la liberan komunismon, al kiuj strebas la Revolucio, kiun faris la laboristoj kontraŭ la hispana kapitalismo k internacia faŝismo.

Ĉiulandaj laboristoj, helpu nin!

La internacia politika situacio, ekestinta kaŭze de la lastaj decidoj de la konsilantaro ĉe la Ligo de la Nacioj, estas ekstreme neorientita. La respondo, kiun senprokraste donis la faŝistaj landoj, estas malkvietiga. La plurfoja bombardado de la malproksimaj de la batalfrontoj urboj, la ofta subakvigo de niaj komercŝipoj k serio da aliaj perfortoj, kiujn ĉiutage faras la «neintervenuloj», estas la plejaj kategoriaj pruvoj pri la rekta helpado de la faŝistaro al Franko.

Kiaj estas la malevitablaj konsekvencoj de ĉi-ĉio? Dum la kruela milito, kiun ni subtenadas kontraŭ la internacia reakcio, ni ekspertis neunufoje la minacantan nin danĝeron — elŝipiĝi sur nian marbordon armeon flanke de la faŝistoj. Eble nin atendas ankoraŭ pli granda danĝero. Oni ne devas forgesi ja la okazon rilate al Abisenio.

La internacia laboristaro devas ekkompreni la manovrojn de la faŝismo. Ni ĉiuj devas esti pretaj denunci ĝiajn perver-

sajn projektojn k ilin nuligi. La lasttempaj konfliktoj igis la respublikan registaron postuli la senprokrastan kunvokon de la konsilantaro ĉe la Ligo de la Nacioj. Ni, ĉerpante instruon el ĉi-ĉio, kion fuŝis ĝis nun la Ligo de la Nacioj, ne kredas k ne atendas helpon de ĝi. Nia unika solida apogilo povas esti la proletaj organizaĵoj.

Ĉiulandaj laboristoj; je la nomo de niaj komunaj interesoj k idealoj vi devas decide ekstarti ĉe la flanko de siaj hispanaj fratoj. La internacia laboristaro devas levigi solidare kvazaŭ unu homo. Ne forgesu; samklasanoj, ke estas farendaj superaj klopodoj por doni frakan frapon al la internacia faŝismo, kiu minacas subpremi ne nur la hispanan revolucion, sed ankaŭ la tutmondan laboristaron k la mondkulturon.

Ĉiulandaj laboristoj, por via estonto k tiu de hispana popolanaro, EK AL HELPO!!

KRISTANA EŬROPO!?

(Letero forsendita al sveda kamaradino de nia kunlaboranto)

Kamaradino, mi promesis skribi al vi denove. Hodiaŭ mi plenumas mian samideanan promeson. Kvankam kun ioma prokrasto. Vi ja scias, ĉi-tie okazas milito k paralele kun ĝi revolucio. Ĉi-ĉio nature perturbas normalan interkorespondadon.

La milito, kamaradino, daŭras. Pli k pli kruela. Pli k pli senhomeca. K mi demandas min: Kie estas la nobleco, la filantropio? Kie estas la homo, la vera homo, la homeca homo? Jen manulo Franko plue akiradas militmaterialon de la ĝemeloj Mussolini k Hitler, dezertigas hispaniajn fekundajn kamparojn, ruinigas florantajn urbojn, ekstermas la enloĝantaron. K sin nomas aŭtentika hispano, naciisto?! K lia nomo paralele kun tiuj de Mussolini k Hitler estos enskribita en la historia katalogo kiel de glora, sperta, granda militisto, patrioto! Kia amara ironio! kamaradino.

La 29-an de Majo je la 3^a horo frumatene, 7 faŝistaj aeroplanoj atakis Barcelonon. Mi loĝis ĉe la altaĵeto Tibidabo, kie mi laboris... Ĵus mi estis ekdorminta. Sinsekvaj fortegaj eksplodoj vekigis min. Mi duondorma ekrigardis tra la fenestro. Incendioj (fajregoj) lumigis Barcelonon en la krepuskiĝo. La eksplodoj daŭre sekvis. Aŭdiĝis mitralilo. La bruado de la aeroplanoj malbonsigne zumadis super la urbeĝo...

Mia intereso de proletjurnalisto spronis min malsupreniri. Vidi propraokule la domaĝojn. K, kamaradino, kia senhomeca senkompato, kia senlima krueleco, kia perversemo, kia senkor-eco! La celoj de la faŝistaj aeroplanoj estis preskaŭ ekskluzive la malriĉaj k pacaj laboristaj kvartaloj. Multaj domoj estis detruitaj de la bomboj. Mi propraokule vidis: centkilogramo bombo estis trafendinta la etaĝojn, atingis la teretaĝon, k feliĉe ne eksplodante. La saviĝintaj hejmanoj, ĝismorte teruritaj k paliĝintaj, timeme rigardis tra la senvitraj fenestroj. Patrino kisis siajn infanojn pro ilia saviĝo.

Mi korpemite iris al alia kvartalo. Alia centkilogramo bombo estis trafendinta la etaĝojn, atingis la teretaĝon, eksplodis, detruis la domon k restigis sub la ruinoj la tutan hejmanaron. Fajrobrigadistoj k ruĝkrucanoj eligis el sub la detruaĵojn dispecigitajn homajn estaĵojn: virojn, virinojn k infanojn.

Alia domo estis celo de mitralilo. Preskaŭ ĉiuj hejmanoj estis mortpafitaj. Unu patrino por savi sian filineton dujaran, metis sin sub sin, tiele saviĝante la flineto k mortigante la patrino.

Pli ol 80 homaj estaĵoj estis pereigitaj. Pli ol 100 kripligitaj k vunditaj. K kamaradino, jen estas la plej indigniga. La faŝistaj aviadistoj ne celis militobjektojn: municik armilfabrikejojn. Ne. Tiuj senkoruloj detruis la dometojn de la malriĉaj k pacaj laboristoj. Ili simple mitralile mortigis. K mortigis plenkonscie. K pro kio? Kia estas la kulpo de la pacaj k malriĉaj laboristoj? De la produktistoj de la vivbezonaĵoj? Pro tio, ke ili estas ruĝuloj. Pro tio, ke ili volas pli da pano k sopiras al pli da libero. K kamaradino, tia mitralil-

paŝado ne registriĝis unike en Barcelono. Ĝi estas praktikata de la faŝistoj laŭsisteme multloke. En Bilbao, en Gernika, en Madrido. Mitralile la faŝistaj aviadistoj ekstermis la loĝantaron de Gernika. Mitralile ili plu ekstermas la loĝantaron de Madrido.

En la ĉi-vespera numero de la gazeto «La Noche» mi trovis la jenan korespondaĵon el Madrido.

«Ni, grupo da ĵurnalistoj, vizitis unu hotelon, kiu estis transformita en hospitalon. La salono svarmas pro vunditoj, ties familianoj k amikoj, kiuj estis venintaj por vidi ilin. Estas tago de intervidiĝo. La vunditoj utiligas la feston intervidiĝi kun siaj intimuloj. Ĉe la eniro en ĉi salonon ampleksan la unua, kion vidas la okulo, estas la lambastonoj apogitaj al la seĝoj, en kiuj estas sidantaj la vunditoj. Poste brakoj ĝipsitaj, brakoj sen artikoj, brakoj kripligitaj. Oni eligas la brakojn el la forta korpo k la kontrasto impresas draste. La rigardo ankaŭ detenas sin impresite sur la pecojn da femuroj, el kiuj estas eligitaj la kruroj. De kelkaj vunditoj, kiuj marŝas per lambastonoj, pendas la pantalona tubo malplena. Ili devas sendube disiĝi de la kostumo, kiun ili uzis antaŭe la milito. Tielsame iliaj malutiligitaj membroj, iliaj membro-stumpoj rezistas elmontri sin malkompletaj. La membro-stumpoj persistas antaŭeniri kvazaŭ kontinuas esti unuigitaj en piedo. K pro tio kiuj forlasas la kuŝejon, en kiu la penso estas alktumigi al la timo troviĝi senpieda, nun lernas denove paŝi. La lambastonoj ne sufiĉas k aliaj devas subteni la vunditojn.

En ĉi-tiu spektaklo, kiu prezentigas ĉe la eniro en la hotelon, desegniĝas la plej dolora aspekto de la milito.

Ĉi-tie estas soldatoj, kiuj vundite falis, kontraŭbatalante malamikon. Estas tamen aliaj vunditoj, kiujn hodiaŭ mi venas vidi. Temas pri la virinoj, kiuj estis mitralitaj ne irante al la batalfronto k ne estante armita parto. Oni ne povas diri, ke ili estas viktimoj de la milito, nek rentoj, kiujn la milito postulas en sia barbareca leĝo. Ili estas viktimoj de la impulso de malnobla koleriĝo, de sistemigita krimeco. La plej barbarecan demonstron, kiu estas elmontrebla al la mondo kiel simbolo de senlima krueleco flanke de la faŝistoj, mi vidis en la salono numero 1^a de ĉi-tiu hospitalo: infanino proksimume unujaraĝa sen piedo, en la sama lito ĝia patrino sen brako.

En alia lito troviĝas knabino kun pala vizaĝo k febra brilo en la okuloj. Kompanie estas aliaj du junulinoj. Ili ne estas vizitantinoj. Unu el ili portas tre dikan bandaĝon ĉirkaŭ la brako. La kuŝanta ridas senforte, atentsekvante la serĉojn de siaj amikinoj. Ili estas mitralitaj k estas tiel junaj, k ties korpoj estas disŝiritaj. La tri inoj estas vunditaj diversloke. Kiu estas pli grave vundita, kiu ne povas leviĝi, nomiĝas Antonia García. Ŝi estas 16 jaraj.

—Ni estis elirantaj el «Sepu» —ŝi respondis al mi— Mi aŭdis la eksplodon k ne rememoras pli. Mi kredas, ke oni forportis min al la hospitalo kune kun multaj aliaj vunditoj.

Ŝi estas vundita en la ventro k la brusto. De mitralilo. Strio da disŝiraĵoj.

—Ŝi estis preskaŭ morta —diras al mi ŝiaj amikinoj.

Nun ŝia tuta korpo estas envolvita en kiraso da bandaĝo. Ŝi ridas kvankam ŝia rido estas tre malforta.

Karmen González, la vundita en la brako, estas 16-jara. Ŝi naskiĝis en la diboĉaj kvartaloj. Ŝi parolas malembarasiĝe. Ŝin ne vundis obuso. Estis kuglo de mitralilo. Ĉu ĉe la fronto? Ne. Ĉe la sojlo de ŝia domo. En Carrera de San Francisco. Faŝista aviadisto pafadis mitralile. Faŝista aeroplano, kiu dispafadis metralile super la stratojn de Madrido. Kontraŭ kiun flugis la kugloj? Kontraŭ la personojn, kiuj kuris sur la stratoj. Kiam la kuriozaĵo venigas al la balkono la homojn, la germanaj aeroplanoj forsendas mitralile kugloventojn. Multaj ne kredis. Kiam ili falis mortaj k vunditaj konvinkiĝis.

La tria knabino nomiĝas Rosa García. Ŝi estas 15-jara. Ipostagmeze ŝi iris al kino de Gran Vía k mitralilo trafis ŝin.

—Mi estis atendanta en Rialto por aĉeti aĵojn k ekkomencis fali obusoj. Ni ĉiuj rifuĝis sub la Stupareton, sed eĉ tie min trafis la mitralilo.

Laŭ ŝiaj diroj estis multaj vunditoj. Ankaŭ mortintoj. Oni ŝin kuŝigis en la liton. Pli poste oni ŝin operaciis por eligi kuglon. Oni devas ankoraŭfoje operacii ŝin por eligi alian kuglon».

Tiel raportas la korespondanto, kamaradino. K Eŭropo silentas! La kristana Eŭropo estas profunde silentanta! Ĉu ĝin ne pinglas konscienciproĉoj!?

Aliam mi skribos pri alio.

Elkore salutas vin: PARIO

Junio 937^a — Barcelono.

POPOLHEROOJ

CIPRIANO MERA

Ankoraŭ unu homo, amata k admirata de ĉiuj, reliefigis en la gazetaro pro sia revolucimilitago —Cipriano Mera. La plej gravaj presorganoj, esprimantoj de diversaj kontraŭfaŝistaj sektoroj, videbligis en siaj paĝoj la brunan vizaĝon de la brava

batalanto liberecana, disvastigante la novaĵon plaĉan pri venkdona batalo en Guadalahaĝara, dum kiu oni forprenis al la malamiko sep vilaĝojn. La eksterlanda gazetaro ankaŭ informas sian legantaron pri ĉi okazaĵo, k el tio la populareco, kiun ĝuas nia kamarado, trapasas la landlimojn, gravurante en la menson de la internacia proletaro la nomon de Mera kiel unu el la plej elstarantaj defendantoj de la popollibero.



Ekster tio, tamen, ni certas, estas homoj, kies scivolemo restos nesatigita per la simpla informo pri la herooĵoj elmontritaj de Cipriano Mera, sed dezirus ekkoni liajn agojn antaŭmilitajn, kielsame la motivojn de lia famiĝo. Koncerne tion tre simpla estas la respondo. Tiel simpla kiel la vivo mem de ĉi-admirinda komandanto de la Popolarmeo, kiu dediĉis sian junecon al heroo batalado por la liberigo de siaj samklasanoj.

Cipriano Mera, nune estro de 14^a Divizio, estis antaŭe 19^a de julio laboristo de Konstrubranĉo en Madrido. Li estas konita pro siaj multfojaj partoprenoj en strikoj, movadoj k multaj agoj, celantaj la emancipiĝon de la laboristoj. La polico k la labordonantoj timegis lin, ĉar ili konis lin devkonscia, kies rajtojn, kiuj ne estis aliaj ol tiuj de liaj laborkamaradoj, neniu povis forpreni. Persekutite k enkarcerigite ofte, li ekonis la teruraĵojn de la kapitalista reĝimo, hardante en ili sian

spiriton tiele, ke ekde dumjuliaj gloraj tagoj elmontrigis kiel unu el la plej firmaj batalantoj el la popolmilicnaro. Poste, kiam Madrido estis travivanta la krizajn momentojn, dum kiuj la malamikaro minacis invadi la ĉefurbon, Cipriano Mera estis, kiu per sia prestiĝo de batalanto k sia persona aŭdacemo sukcesis aliformigi la madridajn tranĉeojn en muregojn maldetruelajn de la krimema faŝismo. Pli poste, ignorante la danĝeron, la kamparoj de Alkario estis teatro de lia heroismo k li spertis kiel estro de la Konfederaciaj milicoj enkadrigitaj en la Revolucia Armeo. Nune la nura anonco pri lia nomo sufiĉas por malfortigi la moralon de la italaj trupoj en Guadalahaĝara k malorientigi la superan komandantaron malamikan.

Ja tio estas Mera, la simpla laboristo el Madrido, figuro elmontriginta dum nia revolucimilito por la triumfcertigo k la fiero de la organizaĵo, je kies nomo li militas — C. N. T.

Revoluciaj konkeraĵoj

La agrikultura mastrumejo en Prat del Ljobreĝat

En la historio de la socialaj bataloj Prat del Ljobreĝat ĉiam estas preninta unuan lokon. Laŭ subaĉetitaj jurnalistaĉoj la laboristoj de ĉi vilaĝo ĉiam montris sin en siaj ideaj bataloj kiel fanatikuloj k sektuloj. La faktoj, tamen, diras la kontraŭon. En ĉi vilaĝo antaŭe 19^a de julio ne ekzistis alia organizaĵo ol C. N. T. Depost ĉi dato, tamen, oni fondis sindikaton apertenantan al U. G. T. La ŝajna sekteco ne ĝenis la laboristojn ĉe ambaŭ organizoj interrilatigi sin ĉutkore. K hodiaŭ en Prat de Ljobreĝat ekzistas serio da kolektivigitaj entreprenoj k agrikulturaj bienoj sub la ĝenerala kontrolo de la sindikatoj de C. N. T. k U. G. T.

La frukt- k legomĝardenoj, kiuj estas kulturataj, havas 15.000 dekarojn da fekunda tero, ĉiutage miloj k miloj da kilogramoj da legomoj k fruktoj estas transportataj al la Barcelona loĝantaro.

Ĉi tiu bieno estis kolektivigita dum oktobro pasintjare de la sindikatanoj de ambaŭ organizoj. La kolektivigo baldaŭ malkontinuigis la senlaborecon en la vilaĝo ne nur inter la terkulturistoj mem, sed ankaŭ inter la ceteraj vilaĝanoj. Nune en la bieno estas okupataj 110 viroj k 300 virinoj. Ĉiuj laboristoj enspezas 70 pesetojn monate. Tiagradan salajron enspezas ankaŭ la vidvinoj k la malsanuloj. La bieno estas sekuriginta ĉiujn membrojn pri eventualaĵoj.

En la daŭro de sia okmonata ekzisto ĝi estas doninta 50.000 pesetojn por militbezonoj k multajn ŝarĝaŭtomobilojn da nutraĵoj por la fronto.

Ĉiuj membroj de la kolektivigita bieno, instigate de la espero al nova vivo, laboras grandentuziasme.

Alia granda entrepreno en Prat de Ljoregat estas la fabrikejo por papero, kolektivigita de la laboristoj. Tiu ĉi entrepreno estis antaŭe la Revolucio propaĵo de la granda entrepreno «Hispana Papero». Ties posedinto Kont Aresti, personaĉo kun stranga influo en la politiko k la financoj, ekspluate gajnadis milionojn da pesetoj. Diego Ruiz skribis siatempe pri li: «Tiu magnato de papero, dank' al la evidenta kontribuo de la profesiaj juĝistoj k armitaj fortoj, kreadis k altrudadis leĝojn. Tio klarigas lian tromemfidan sintenon dum la strikoj, malakceptante kontentigi la justajn postulojn de siaj laboristoj».

En majo 1936^a komenciĝis striko, kiu transformiĝis en ĝeneralan por la tuta paperindustrio en Katalunio k daŭris dek semajnojn. Ĝis la ekigo de la faŝista ribelo. K ĝis la ekigo de la Revolucio, kiu malkontinuigis la senhontan ekspluatadon de Kont Aresti k liaj eŭnukoj. Forigante la kapitalistan ekspluatadon la 600 laboristoj kolektivigis la entreprenon, formante fabrikejan konsilataron, kiu konsistas el po kvin laboristoj de C. N. T. k U. G. T., kiuj ekster la fabrikeja administrado, laboras en iu fabrikeja fako.

La teknikistoj kondutas dece k interesiĝas pri la fabrikejaj aferoj, k la teknikaj inĝenieroj ĉe la konsilantaro donas ekzemplon de fervoro k sperto. Paralele kun la ĝenerala laboro en la fabrikejo, oni faris ĉion eblan pri ĝia modernigo, instalante banejojn, ventolilojn k. a. Estas mencienda la instalo de kuracejo, plejbone aranĝita k provizumata je ĉio necesa en kromaj okazoj.

La laboristoj en tiu ĉi kolektivigita entrepreno nun pristas perfektigi ĉion, k la posedinto antaŭe pripensadis kiel ekspluatadi ilin.

Bedaŭrinde kaŭze de la deklarita de la eksterlandaj potencoj ekonomia bojkoto, ĉi industrio, kielsame aliaj, malhavas la necesajn unuajn materialojn. Pro tio kelkiuj restas neokupataj, tamen enspezas kiel la laborantaj.

La fabrikejo subtenas en la batalfronto 90 milicianojn, kiuj estis laboristoj en ĝi. Plie ĝi subvencias lernejon, en kiu estas edukataj 100 infanoj.

Tiel funkcias k progresas ĉi tiuj du kolektivigitaj entreprenoj k multaj aliaj, pri kiuj ni raportos sinsekve.

**Ĉiuj al Roterdamo je SAT-Kongreso,
okazonta de la 1^a - 7 de Aŭgusto!**

La farso de Eden

Kaŭze de la «Komitato pri Neinterveno», kaŭze de la aĉa politiko de tiu ministro, milfoje pli perversa ol la plej perversa faŝisto, kiu nomiĝas Anthony Eden, la libera Hispanio estas elmetita je krueleco k ĝiaj proletoj, ĝiaj herooj sen savo, sen ebla helpo estas alpremataj sub la nekvietigeblan mitralilon de la faŝistaj potencoj.

Ne estas hispanoj, kiuj blokas la elturmentitan Hispanion, ruinigante ĝin per aeroplanoj, tankoj, artillerio teŭtonaj k italaj.

La okazo plej cinika, plej terura, plej timinda, kiun rakontados tra la centjaroj la historio, estas tiu, ke aktuale estas premata la proleta Hispanio pro fiago k kulpo de kelkaj kastroj diplomatoj, sklavo de la kapitalismo, de la faŝismo, kiu militas senlace, senhonore, seninde por superregi la konsciencojn, kiuj restas ankoraŭ liberaj en kaduka Eŭropo.

Sinjoraĉo Eden, la malkongrua, la fatala makiavelemulo sinjoraĉo Eden povas esti kontentigita pro sia fiago. Li fuŝadis, tributadis klopodojn al la paco, sed al la paco de la mortintoj.

Sed Hitler k Mussolini, apokaliptikaj furio de detruemo, malbenitaj monstroj, stelirintaj el la infero per inundi per sango k aĉaj pasiejoj la mondon, ne sukcesos danki al li. K eble la malbenoj, kiuj nun burĝonas nur en la ŝiritaj brustoj de la hispanaj antifaŝistoj, trafos lin el la buŝo de liaj memaj sam-patriotoj, kiam la germana mitralilo, la mitralilo de «Duce»



La faŝista internacio pacigos la mondon.

detruos, neniigos la anglajn virinojn k infanojn, kiam la teruro de la ĝenerala milito atingos al la mema angla teritorio, ruinigante, detruante unu post alia la urbojn kiel logika konsekvenco de la doktrinoj pri kompleta detruo, kiujn nun oni eksperimentas en la malfeliĉa proleta Hispanio.

Ne estas dubeble, ke la milito, la milito eŭropa k tutmonda, estas neevitebla, se oni ne sukcesos ĝin haltigi, disŝiri ĝiajn internajojn, eligi ĝiajn dentojn, fortranĉi ĝiajn ungojn dum nia emancipiga lukto. La fia sadismo, avidanta krimojn de la grandemulaĉoj el Berlino k Romo ne kontentigos sin per la mizera, malgraŭ lardoriĉa detranĉaĵo el Hispanio.

Sed baldaŭ la sentaŭguloj, la marionetoj de la eŭnuka diplomatio vidos sin tretitaj, venkitaj, premitaj de la veraj hispanoj, kiuj subtenadas la teruran kampanjon, kiu aktuale disvolviĝas en Hispanio sub la aparato, sub la masko de unu kvanzaŭta timigilo, kiu por senhonorigi ĝin, ne hezitis ĝin perfidi, vendi al pli fervora pretendanto, al pli bona subtenanto de lia krimo.

La sangosoifantaj buĉistoj, paladenoj de la faŝistaj aspiroj, sklavo de Hitler k Mussolini, laboradas, operaciadas, manovracas en siaj aspiroj dank al la optimismo k stulteco de tiu

cinika diplomato, kreinto de la pajaca farso-teatro «Neinterveno» en Londono. Estus bone, se, malgraŭ liaj penaĉoj, malgraŭ la iliota fuŝado, ne efikus. Sed, proletoj, de vi, de vi unike dependas tio. De vi dependas la savo de la proleta Hispanio, de vi mem dependas via mema savo. Ĉar se la proleta Hispanio estos savita el la faŝismo ankaŭ la tutmonda proletaro eljugiĝos el la multcentjara jugo de la kapitalismo, kiu kiel polipo estas kaptinta vin k viajn infanojn k eluĉadas vian proletan sangon, vian sanon.

Por la savo de la proleta Hispanio, por via mema liberiĝo, ekagu senprokraste, energie, tutforte. Poste ja estos malfrue k senefike...

En kolektivigita Aragono

Unu el niaj kunlaborantoj, kiu antaŭnelonge revenis el Aragono, kiun li travojaĝis, raportas jene.

En ĉiuj vilaĝoj en Aragono, la plurajn el kiuj mi vizitis, estas kolektivigitaj bienoj, sed paralele kun ili ekzistas ankaŭ etterkulturistoj. Tri kvaronoj el la tero de Aragono estas kolektivigita. La etbienoj estas kontrolataj de la kolektivigitaj bienoj, en kies manoj estas la intersanĝado k la distribuado de la vivbezonaĵoj.

La partoprenantoj de la kolektivigitaj bienoj estas membroj de la vilaĝaj sindikatoj ĉe C. N. T. aŭ kamparanoj sub ties influo. Estas ankaŭ eta procento da bienoj sub la influo de la alia sindikata organizaĵo U. G. T.

Interese estas montri kiel estas organizita la laboro ĉe la kolektivigitaj bienoj. La laborloĝantaro —la viroj pli ol 14 jaraĵ estas organizitaj en grupoj laŭ reciprokaj kontaktoj aŭ simpatioj. Ĉiu grupo elektas po unu delegato, kiu laboras kun ĉiu k ne havas ian specialan administran aŭ regan funkcion. La delegatoj kunvenas vespere por pritrakti la aktualajn laborproblemojn. Ĉiumonate okazas ĝeneralaj kunvenoj, kiujn partoprenas la tuta loĝantaro de la komunumo.

Mi ekinteresis vidi kiel estas pagata la laboro k konstatis, ke la mono estas eliminata de uzado. La mono estas akumulita en la distrikta komitato de la kolektivigitaj bienoj k estas uzata en la interkontaktoj kun la ceteraj regionoj, kie la mono ankoraŭ ne estas eliminata. Anstataŭ mono ĉiu vilaĝo havas siajn specialajn biletojn, kiuj havas valoron nur en la teritorio de la vilaĝo. La laboro estas pagata per ĉi-tiuj biletoj. Estas enkondukita la familipago. Jen ekzemple kiel pagiĝas en la vilaĝo Eksplus, situata proksime de Huesko, kiun vilaĝon mi detale pristudis. La produktistoj —la terkulturistoj, la metiistoj k la instruistoj, la kuracistoj k. a. ricevas ĉiusemajne biletojn valoratajn 25 pesetojn. La edziĝintoj ricevas 35 pesetojn, se havas infanon malpli ol 14 jaraĵ —38 pesetojn; du infanojn —42 pesetojn; tri infanojn —46 pesetojn; kvar infanojn —50 pesetojn; kvin infanojn —55 pesetojn. Se la infanoj estas pli ol 14 jaraĝaj, la familisemajnpago estas determinata jene. La gepatroj —31 pesetojn; por la unua filo —15 pesetojn; por la dua —14 pesetojn; por la unua filino —12 pesetojn; por la dua —11 pesetojn, ktp.

Per tiu ĉi rekompenco estas sekurigata kompletan kontentigon de ĉiuj materialaj bezonoj. Se la produktisto estas sola, li povas vivi per 17 pesetoj semajne. Estas elspezeblaj de ĉiu familiano ĉiutage po 5 pesetojn por nutraĵoj. Unu vira lankostumo kostas 60-70 pesetojn. Virina vesto (3 jupoj, mantelo k tolaĵo) 100 pesetojn.

Por mi ekzistis unu problemo. Mi estis volema vidi kiel fariĝas la distribuado. Ĉiu vilaĝo posedas komunan magazeno kun kelkaj deponejoj. El la komuna magazeno, kie estas ĉio, ĉiu akiras kontraŭ pago per biletoj tiom da produktaĵoj, kiom volas. Limigo estas nur pri la viando k la sukero: Normiĝas po 150 gr. da viando al ĉiu laboranta familiano k al la ceteraj po 50 gr. potage. La sukero normiĝas po duonkilogramo al familiano monate.

La privata komerco ne plu ekzistas. En la vilaĝoj, en kiuj estas etmastrumantoj, la produktitaĵoj de la lastaj estas akceptataj en la komuna magazeno. La etposedantoj (tielnomataj individualistoj) akiras ĉion el la komuna magazeno, sed je pli altaj prezoj. Oni konsideras justa preni de ili pli, ĉar ili ne oferas ion por la organizigo de la komuna intersanĝado. Pluraj mastrumantoj ĉiutage aliĝas al la kolektivo.

La privata posedaĵo jure ne plu ekzistas. Ĉio apartenas al ĉiuj: tero, brutaro, inventaro, k. c. La etposedanto rajtas utiligi la teron, sed sen dunglabormano. La laborbrutaro ankaŭ estas kolektiva escepte de la kokinoj, kiajn mi renkontis po 20-30 en ĉiu domkorto. La brutaroj estas grupigitaj en specialaj brutarejoj. Ĉiu familio rajtas utiligi teron kioman volas por legomoj, sed kondiĉe ĝin prilabori dum la libera tempo.

Produktis al mi drastan impreson la laboro en la lernejo. Kaŭze de tio, ke en la pasinteco la procento de la analfabetanoj estis granda; hodiaŭ lernas interkonkurante maljunuloj k junulo. K en la lernejo blovas la nova spirito. La programo estas vasta. Unualoke kuŝas la historio de la revolucio, naturscienco k agrikulturo. Aplikiĝas la metodoj de la moderna lernejo. Larege estas akcentata la pentrarto. Ĉio ilustrigas. Paralele kun la lernejoj progresas same la legejoj. La junularo estas kreinta bone aranĝitajn bibliotekojn.

La sanitara k la higiena kontrolo estas komisiita al la kuracistoj. La kuracado estas senpaga. Estas malfermitaj novaj malsanulejoj. La kuracistoj, kun kelkaj el kiuj mi havis eblon konversacii, estas sindonemaj al la komunumo k sentas, ke plenumas kieldece sian socialan k sanigan mision.

Mia impresoj pri la ĝenerala konstato estas, ke mankas nenio. Post kiam Aragono estas kontentigita ĉiujn siajn bezonojn k estas antaŭvide kalkulinta la necesan ĝis la nova rikolto, estas neta malmanko da 2 milionoj kgr. da olivo, 30 milionoj kgr. da safrano k unu k duono miliono kgr. da tritiko. Ĉiuj kampoj estas semitaj k bone prilaboritaj.

Krom la homsubteno la kolektivaj bienoj estas donintaj al la milicoj nutraĵojn po pli ol 20.000.000 pesetoj, kiujn la centra registaro al ili ŝuldas k egajn kvantojn da senrekompencan subtenon. Tiel ekzemple, Eksplus, la vilaĝo, kiun mi priparolis, ĉi supre, kun 1.200 loĝantaro estas doninta 7 vagonojn da tritiko, 500 dekduojn da ovoj, 30 bovojn, 500 ŝafojn k. a. al Madrido.

Kompreneble la milito estas la centro kiu okupigas ĉiujn. La nova vivo estas enverŝinta tiom da entuziasmo k kredo en la venko, ke se iu asertus la malon, oni povas, estas direble, lin deklari apostatulo.

DEMANDARO

La hispana liberecana junularo direktas al ĉiulandaj liberecanaj junularoj la jenan demandaron.

Ĉu ekzistas junulara liberecana movado en via lando?

Kia estas la celo de via movado anarkista aŭ anarko-sindikalista?

Kiel ĝi estas regata?

Kiam estis fondita?

Kioma estas la numero de la anoj k la influo inter la junularaj amasoj?

Ĉu ĝi havas propran presorganon aŭ kolonon en iu gazeto?

Kiel funkcias en sia organika vivo via movado?

Kiaj aliaj junularaj organizaĵoj en via lando ekzistas k kian influon havas?

Iuj pli rimarkindaj agoj de via movado?

Ĉu subtenas rilaton kun aliaj pli aŭ malpli parencecaj organismoj?

Kiaj estas viaj rektaj celoj post la revolucio?

Kia estas via opinio rilate la hispanajn aktualaĵojn?

Kiajn interrilatojn vi havas kun la antimilitaristaj organizmoj?

Antaŭ la aktualaj cirkonstancoj, kiel via opinio oni devas enpenetri la propagandon inter la junuraraj medioj?

Ĉu vi konsideras necesa iu revizio pri la taktiko k konceptoj sur la anarkista kampo?

Respondojn sendu al nia redakcio.

RECENZEJO

Ni recenzos ĉiun ricevotan libron.

«INTERNACIA KANTARO», 64 paĝa, prezo 4 fr. fr.; eldonaĵo de «LA JUNA VIVO», Vest-Grafdijk, Nederlando.

La kantaro enhavas 34 kantetojn, kiuj estas presitaj unuope en «La Juna Vivo» dum ĝia 3 jara ekzisto. Ĝajaj kantetoj porknabaj k porjunulaj. Aparte rimarkenda estas «Himno». Nu tiaspecaj kantetoj estas akcentendaj por knaboj k junuloj verdstelaj.

La traduko de la kantetoj estas flua. La prenitaj el la germana lingvo-vortoj «darfi» k «bunta» (dürfen k bunt), mal- estas en la Plena vortaro. Pri la vorto «temeŝvaro» ni trovetis nenian klarigon.

PARIO

Kroniko

Generalo Mancini, komandanto de la italaj trupoj, milit- antaj en Hispanio, publikigis jenan ordonon:

«La supera faŝista konsilantaro, sendante sian saluton al la armitaj fortoj, kiuj militas je la ordono de la ekselenc- o generalo Franko, oficiale akceptis la 50.000 soldatojn, kiuj militas en la hispania lando sub la signo k por la gloro de Littorio.»

Ke la italaj faŝistoj plej energie helpadas la hispanajn, ke ĉe la flanko de Franko militas italaj soldatoj, kiuj perforte estas senditaj — tion scias la tutmonda publiko. Sed ke la nombro de la senditaj soldatoj estas atinginta 50.000 — nu tion ni ne sciiis. Certe la ĉefroluloj de la nove formita farso-teatro «Ne-interveno» estis informitaj pri tio siatemp.

La faŝista satrapo generalo Mola, kiel sciigas, peris sekve de aeroplankatastrofo. Laŭ fidindaj onidiroj la katastrofon okazigis la aviadisto mem Chemorro, kiu estis anarkisto k kiu neunufoje estis jurinta malpliigi la nombron de la tiranoj almenaŭ per unu.

En la majaj akcidentoj estis mortigita bestece la granda itala anarkisto Kamilo Berneri. Li estis tutmonde konita filo- zofo k publicisto. Kiel sia samlandano Mateotti, kiu estis viktimo de la itala faŝismo, Berneri estis dediĉinta senrezerve sian vivon, sian familian trankvilon al la proletara afero eman- cipiga. Frato Berneri, ni, kiuj restis vivaj, daŭrigos abnegacie nian komunan aferon ĝisfinvenko.

La kretenismo de la «Komitato pri Neinterveno» atingis sian kulminon. En ĝia tagordo ja figuras kiel precipa la temo pri la humanigo de la milito. Hm! Milito k humaneco!? Sed kion alian povas blufi la klaŭnoj de la Komitato pri Neinter- veno».

14an de Junio estis mortigita en Bagnoles de l'Orne (Fran- cio) de la hundaĉoj de la itala faŝismo la fratoj Kar'os k Nelji Roseli. Karlos Roseli estis granda antifaŝisto k eminenta publicisto, kiu lastatempe energie klopodadis informadi la ital- ajn laboristojn k kamparanojn pri la neenviinda sorto de la militantaj en la hispania teritorio italaj soldatoj — ties samlan- danoj k samklasanoj.

La faŝistaj kanibaloj daŭrigas siajn kruelajn bombardadojn super la pacaj civitanoj en la ariergardo. La civiluloj-gantaro de Bilbao estis mitralita dum la evakuado sur la vojo de Bilbao al Santander de faŝistaj aeroplanoj, kaŭzante milojn da mortintoj. La civila loĝantaro de la urbo Tarragono ankaŭ estis mitralita 16an de Junio de 3 faŝistaj aeroplanoj, kiuj dispafadis super la stratojn de la urbo, mortigante k vundante multajn el la civi- tanoj.

Dum la lastaj du monatoj la bulgara polico entreprenis areston de multaj kamaradoj. En la ĉefpolicejo, nomata «obŝteŝvena bezopasnost» (publika sekurejo), ili estis mal- bonege traktataj de la policanoj k specialaj torturistoj. Kel- kiuj el la kamaradoj estas batitaj ĝismorte per plej modernaj torturiloj, kiajn kapablas elpensi civilizitaj barbaroj.

La radiostacio diskonigis tra la mondo la falon de Bilbao. Jes, kamaradoj, falis. Pro la 300 germanaj acroplanoj, kiuj multfoje bombardadis ĝin. Pro la fuŝa agado de la Europa pseŭdodemokratio. K pro la nesufiĉa solidaro de la tutmonda proletaro.

La 21an de Junio estis arestita en Barcelono laŭ ordono de la supera poliestro la eminenta liberecana verkisto k publikisto Gonzalo de Reparaz. Liaj ĉiutagaj artikoloj (Diario de Nuestra Guerra) en la plej populara gazeto «Solidaridad Obrera», vekadis viglan intereson inter la multnombra legantaro, plejparte laboristoj, pro ties sagacaj rezonoj k malpeza, de ĉiuj komprenebla stilo.

Demandite de la ĵurnalistoj pri la motivoj de la aresto, la policestro respondis, ke ĝi estas altruidiĝinta pro publikigitaj artikoloj. Sed sinjoro policestro elcerbumis aludi, ke super la preparolataj artikoloj estas ekzercita la enkondukita cenzuro.

Ni plej energie protestas pri la aresto de nia maljuna kamarado.

Nia kamaradoj —esperantistoj, bravege batalantaj en la diversaj frontoj petas insiste esperantajn librojn. Ni klopodas kontentigi ĉiujn, sendante al ili jam senditajn al ni de pluraj esperanto-eldonejoj, precipe de SAT librojn. Tamen la libroj ne sufiĉas. Ni petas la unuopajn proletesperantistojn, grupojn, esperanto-eldonejojn sendi librojn, kiujn ni niaflanke transsendos al niaj bravaj milicanoj — proletesperantistoj, kiuj ofertas sian feliĉon, sian vivon por la liberigo de la tutmonda proletaro. Ni devas ĉiel kontentigi niajn verdstelajn batalantojn. Pro tio ni atendas volonte k grandanime senditajn librojn.

Por ne spliti la fortojn niaj kamaradoj el Stokholmo ĉesigas provizore la eldonadon de «Laboristo», kunlaborante al «Informa Bulteno». Ni laŭprincipe akceptas ilian kunlaboron intensan.

Ĉi-jara kongreso de la plej grankreska proletesperantista organizaĵo SAT okazos en Roterdamo de la 1^a ĝis la 7^a de Aŭgusto. Ĉiu kamarado, kiu havas eblon viziti ĝin, anoncu sin siatempe. Dum la kongreso inter la aliaj grupoj kunvenos ankaŭ la anarkista. Ni atentigas al la kamaradoj vizitontoj la kongreson, konsideru tion. Estos pritraktataj gravaj problemoj. Kiel delegato de «Informa Bulteno» k ILES estos nia kamarado Albert Mas. Li faros detalan raporton pri la aktuala situacio en Hispanio k speciale pri ILES.

La 1-an de Julio je la sepa postagmeze inaŭguriĝis la pomemora surskribŝtono de Durruti, skulptita de la skulptisto Boleda. La inaŭguriĝo okazis antaŭ la placo de Casa C. N. T. F. A. I. Miloj k miloj da antifasistoj alkuris. Ĉeestis ĉiuj sindikatano, anarkistaj asocioj, grupiĝoj k. a. organizoj. Dekoj da nigroruĝaj flagoj flirtis. Paroladis la kamaradoj Kampo, Ĉe na, Oliver, Montseny k Sanz. Ĉiuj paroladis entuziasme k patose k estis tondre aplaŭditaj de la homamasego sub la sonoj de la revoluciaj himnoj.

LETERUJO

SIV. STRE GUILLON.—KEGRIST MOELON. La resp. kup. ricevitaj. Via sugesto pri konto en eksterlando estas akceptenda. Ni nepre starigas tian. Al ĉiuj novaj abonantoj ni sendados la bultenon.

JOHANO CASTET.—LE PERREUX. Elkoran dankon! La 50 fr. trafis siatempe nian kaseton.

JA BRUKSON.—LENINGRADO. Nian dankon pro la sendita belaspekta gazeto. Sendadu ruslingvajn eldonaĵojn. Nia kunlaboranto PARIO konas rusan lingvon. Pri via peto ni jam zorgas. Vsjo horoĉo!

RIVAL JOANNES.—SAINT-ETIENNE. La resp. kup. ricevitaj. Dankon!

MARGARITE ASPES.—FRANCIO. Tutkore ni dankas pri la senditaj 50 fr. fr., kiu nin trafis. Ĉiuj ricevitaj resp. kup. estas menciataj en la leterujo. Ni dankas pro la senditaj resp. kup.

K-do G. MARTINEZ.—FRONTO DE ARAGON. Ni jam sendis al vi pakadon da libroj. Do estu atenta pri la poŝto.

ANTONIO SANCHEZ.—TORTOSA. Laŭeble ni respondos al vi.

T. MOE ELVARDSEN.—MOSJOEN. Dankon pri la resp. kup. Ni sendas al vi propagandan materialon.

ROTTERDAMA Korespondgrupo. Via interesa letero trafis nin. Jajes kamaradoj, vi regule ricevados «INFORMA BULTENO» n. Nian kamaradecan saluton!

PIALLE.—VILLEURBANNE. Antaŭen kamaradon!

A. BECKER.—GOTEBORGO. Dankon pri la esperantaĵoj.

«LA STELO DE ZAMENHOF». La mono, sendita al Ganin, kvankam iom malfrue, trafos nin. Rilate la resp. kup. —Ili estas stampitaj respektive en 1925 k 1930 j. k ne plu valoras.— La kongreso pro objektivaj motivoj nun al nun ne okazos.— «L'ESPAGNE ANTIFACISTE» ne plu aperas pro motivoj diversspecaj. Ni jam sendis al vi la postulatajn numerojn de nia bulteno.

Ni dankas pri ricevitaj resp. kup. al la jenaj kamaradoj: A. DUVAL—G. i. t. VEER, PIERRE THOMAS, HENNING ERIKSSON, HERBERT ROSENDAHL, L. H. HANSSON, M. J. h. v., HOUTERT INGASTON FABRE, A. NILSON, MARTIN KARLSSON, F. J. FELS, J. REH-ORTS, ADR. VAN WIANEN, A. FRY, R. RASSMUSSN.

ARBETARENS REDAKTION. Jes, ni sendos.

K-do BAS WELS, prezidanto de Organiza Kongres-Komitato. Ni kore dankas pri la sendita al nia redakcio letero pere de nia k-do ALBERT MAS. Ni ĉiel klopodas, ke «INFORMA BULTENO» estu reprezentita ĉe la kongreso de SAT.

La redakcio sciigas al la radioaŭskultantoj, ke ĝi ĉesigas siajn radiodissendojn. Pro ne dependantaj de ĝi motivoj.

Presejo «DELTA» - Str. Kortes, 312 - Barcelono